



PENSEO

N-ro 123

Jan./2002

Monata Belettra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 www.anteo.domainvalet.com



Feliĉan Novjaron!

Kian la Vivo Bezonas?

Liu Yanmin

S-ro Leo Royston, kun talimezuro de 6.2 futoj kaj korppezo de 385 funtoj, estis la plej dika filmstelulo de Hollywood. En 1936, kiam li faris prezentadon en Britio, li estis sendita al Thompson Urĝsava Centro pro sia kora prostracio. Kvankam la kuracistoj utiligis la plej efikajn medikamentojn kaj la plej modernajn ekipaĵojn, ili ne povis savi lian vivon. Ĉe la mortosoĵlo, Royston senespere murmuris, “Kvankam vi havas enorman korpon, via vivo tamen bezonas nuran koron.”

Tiuj vortoj de li diritaj profunde emociis Horton, la ĉeestantan ĉefon kaj toraka specialisto de la urĝsava centro, kiu faligis siajn larmojn. Por esprimi sian respekton al Hoston kaj atentigi tiujn pacientojn kun supernormal korppezo, li gravurigis tiujn ĉemortajn vortojn sur la muro de la konstruaĵo.



En 1983, alia usonano kun la nomo de Moor, kiu estis petrola magnato, enhospitaliĝis ĉi tie ankaŭ pro kora prostracio. Dum la milito inter Irako kaj Irano, liaj dek kompanioj en Ameriko sin trovis en

krizo. Por liberigi ilin de la krizo, li senĉese navedis inter la landoj de Eŭropo, Azio kaj Ameriko, tiel ke li refalis en sian malnovan malsanon fine kaj devigite enhospitaliĝis.

En la Thompson Hospitalo, li lue proprigis al si unu tutan etaĝon, kie instaligis aldonaj kvin telefonoj kaj du faksimilaj maŝinoj. *Thames Tagĵurnalo* siatempe troige priskribis la eventon, “Thompson — la Petrola Centro de Ameriko”.

La kora operacio estis tre sukcesa. Li elhospitaliĝis nur post unu monato, sed li ne revenis al Usono. Li ekloĝis en la vilao en Skotlando, kiun li aĉetis antaŭ dek kelkaj jaroj. En 1998, kiam la hospitalo celebris la centjaran jubileon de sia fondiĝo, li estis invitita por ĉeesti la celebradon. Demandita de ĵurnalistoj kial li forvendis siajn kompaniojn, li finger montris la orkoloran surskribon sur la muro de hospitala konstruaĵo kaj diris, “Leo Royston.”

Oni ne scias, ĉu tiuj ĵurnalistoj vere komprenis tion, kion li signifias. Fakte, nenia raportaĵo rilata al tiu evento povis esti trovita en siatempaj ĵurnaloj. Poste mi eltrovis unu frazon en lia biografio: Riĉeco kaj korpdikeyo ne malsamas, kaj ambaŭ superas tion, kion oni bezonas.

Eble tio estas la respondo.

elĉinigis **Wei Lai**



EL «LAŬZI»

ĈAPITRO 39

(Tiu ĉi ĉapitro komenciĝas per la mencio pri la universaleco kaj graveco de la Taŭo, el kiu



devenas la Ĉielo, la Tero, la spiritoj, la valoj, la regantoj kaj ĉiuj aliaj estaĵoj. Ĝi daŭrigas per la aserto, ke se la Taŭo estos perdita aŭ malobeata, ĉiuj estaĵoj, de la Ĉielo kaj la tero ĝis la reĝoj kaj la princoj, ne plu ekzistos.

La titoloj *gu* (orfo), *gua* (soleculo) kaj *bugu* (senindulo), per kiuj la regantoj nomas sin en la antikveco, ja ne estas flataj vortoj, sed per tiaj malestimigaj vortoj ili povis fari siajn majestecon kaj noblecon evidentaj. Laŭzi opinias ankaŭ, ke oni ne devas esti ĉe la plejantaŭo, nek ĉe la plejmalantaŭo, por povi esti libera de ĉia danĝero.)

Jen la atingintoj de la principo de la Unuo¹ ekde la pratempo:

La Ĉielo, atinginte la Unuon, fariĝis klara;

La Tero, atinginte la Unuon, fariĝis firma;

La spiritoj, atinginte la Unuon, fariĝis diaj;

La valoj, atinginte la Unuon, fariĝis plenaj;

Ĉiuj estaĵoj, atinginte la Unuon, grandkvante reproduktiĝis;

La reĝoj kaj la princoj, atinginte la Unuon, fariĝis la estroj direktantaj sian popolon:

Ĉio ĉi tio, al kio ili strebis, estis plenumita per la Unuo.

Se la Ĉielo ne fariĝus klara, ĝi baldaŭ fendigis;

Se la Tero ne fariĝus firma, ĝi baldaŭ skuiĝus;

Se la spiritoj ne fariĝus diaj, ili baldaŭ formalaperus;

Se la valoj ne fariĝus plenaj, ili baldaŭ elĉerpiĝus;

Se ĉiuj estaĵoj ne grandkvante reproduktiĝus, ili baldaŭ formortus.

Se la reĝoj kaj la princoj ne konservus siajn majestecon kaj noblecon, ili baldaŭ perdus ĉiu sian regnon.

Tial la nobleco prenas la humilecon kiel sian radikon,

Kaj la alto prenas la malalton kiel sian bazon.

Jen kial la reĝoj kaj la princoj nomas sin orfoj, soleculoj aŭ seninduloj.


Ĉu do tio ne indikas, ke ili rigardas la humilecon kiel la radikon de la nobleco?

Ĉu do ne estas tiel?

Tial serĉi tro da honoro signifas tute perdi la honoron.

Oni do prefere estu humila kiel la roko, ol nobla kiel la jado.

¹ La "Unuo" estas alia nomo de la Taŭo.



ĈAPITRO 40

(En tiu ĉi ĉapitro Laŭzi elmetas gravan dialektikan principon dirante, ke "Reveno estas la movo de la Taŭo". Tio signifas, ke la Taŭo moviĝas aŭ ŝanĝiĝas al sia malo kaj ĝiaj moviĝoj estas en cikloj. Laŭzi asertas ankaŭ, ke la funkcio de la Taŭo estas malforteco, kiu povas venki fortecon. Krome, Laŭzi referencas kaj malimplicite klarigas sian ideon pri tio, ke ĉiuj estaĵoj en la universo estas la produktoj de la neekzisto.)



Reveno estas la movo de la Taŭo,

Malforteco estas la funkcio de la Taŭo.

Ĉiuj estaĵoj sub la Ĉielo estas la produktoj de la ekzisto,

Kaj la ekzisto mem estas la produkto de la neekzisto.

elĉinigis Wang Congfang



Himono de

Ĉina Popola Liberiga Armeo

Marŝu, marŝu, kaj plu!

Al sun' ni armeo por l' afer',

Kun paŝoj marŝas ni sur ter',

Ĉe ni la nacia plenesper',

Plej potenca estu ni de l' patroland'.

Estu ni idar' de l' laborul'
 Estu ni popola avangard'.
 Ĉiam pretaj, ĉiam bravaj, ĉiam viglaj,
 Ĝis malamikoj ĉiuj pereu,
 Alte flirtu Maŭ Zedong-standard'!
 Jen, muĝas vent' kaj trumpetson',
 Jen, kant' libera en plenton'!
 Kuru ni al la batalejo por liberiĝo,
 Kuru ni al la landa limo de la patrio,
 Marŝu, marŝu! Ni armeo, al suno,
 Al triumfo lasta tra la lando vasta!




elĉinigi**s** **Risel ZHAO Qing**

Ĉio

Bei Dao

ĉio estas sorto
 ĉio estas fluga nuboj
 ĉio estas ek' sen fino
 ĉio estas efemera ĉaso
 ĉia ĝojo senas ridon
 ĉia mizerego senas larm-makulon
 ĉia lingv' ripetas en si
 ĉia kontaktiĝo ŝajnas la unuafoja
 ĉia amo loĝas en la koro
 ĉia pasintaĵ' okazas en la songo
 ĉia espero kunas noton
 ĉia kredo kunas ĝemon
 ĉia erupcio ekas post momenta paco
 ĉia mort' postlasas longan eĥon



elĉinigi**s** **Hongjia**

Poemo de Du Fu



Versaĵo Farita Survoje de la Ĉefurbo al Fengxian Gubernio

Min vestas per katuno
 kruda mi,

oldaĝ' min obstinigi en raci'.
 Ke kun ministroj oldaj min kompari
 mi volis, kiel malsaĝe tion fari!
 Finfine mi min sentas nekonvena,
 kaj turnas al penemo solecplena.
 Escepte se alvokos min la morto,
 ne l' ambicio falas en aborto.
 Prizorgas mi l' popolon ĉiuhore,
 la simpation naskas ja elkore.
 Primokas kunlernantoj min je stulto,
 mi dume dronas febre en kred-kulto.
 Mi ank' dezirus vivi kiel ermito,
 kaj vidi l' sunon, lunon en ir-glito.
 Ĉar regas la monarko kun merito,
 malamas mi foriri por evito.
 Amasas en korteg' nun talentuloj,
 utilas ne la nanoj en anguloj.
 Senhelpe, ve, mi kiel helianto
 ĉiame turnas min al sun-giganto.
 Ĉar nure estas mi malgranda besto,
 kiu nur kontentas pri la ŝirma nesto,
 pro kio la balenon mi envias,
 kiu furiozan maron ja defias?
 El tio venas mi al la konkludo:
 por-peta aŭdienc' — hontinda ludo.
 Mi ĝis hodiaŭ restas senfaranto
 kun polv' kaj kot' kovranta ĝis kolrando.
 Vizaĝe al l' ermitoj sanktaj, noblaj,
 Mi plenas je hontinda sent' duobla.
 Drinkante kaj kantante kun korĝemo,
 Malĝoja mi vivaĉas ĝis ekstremo.
 Jarfine mil, mil herboj velkas morte,
 montetoj krevus en ventego forte.
 Ĉielaj stratoj grizis sub nub-pezo,

